


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO: E. VAN VEENENDAAL-BOUWES, LIMMEN NH. NEDERLANDO • ADMINISTRACIO: T.J.O. CENTRO WESTGRAFTDIJK NH. NEDERLANDO. ĜIRONO 382363 • JARABONO 1.50 NED. GULDENO ĀU EGALVALORO

LA POSEDO DE LA MONDO (George Duhamel).

En la mondmilito 1914—1918 Duhamel estis soldata kuracisto. Iam, post atako, germana kaptito kaptis la okazon preni bombon kaj ĵeti tiun inter la francajn malamikojn. Duhamel ĉeestis, kiam la afero estis raportata al lia kolonelo. Ĉi tiu furioze eksaltis kaj kriis: „Mortpafu la friponon!“

Je kio Duhamel respondis: „Pardonu, kolonelo. Kiam antaŭ kelkaj tagoj unu el niaj soldatoj faris ion similan, vi ekkriis: „Kia heroo!“ Kio estas heroo por unu el niaj, ne povas esti friponaĵo por malamiko!“

Viro, kiu meze de la milita frenezo gardis tiom da veramo, certe kunportis el tiu mizero ion alian ol malamon kaj venĝemon.

Ne per milito aŭ imperialismo li volis venki la mondon, sed per tio, kio estas la plej alta homa posedaĵo: la interna vivo.

Ĝis nun ni ne trovis la veran pacon. Do la vortoj de Duhamel, atestantaj pri pli alta vero kaj pura amo, ankoraŭ estas la necesa kuracilo por la malsana animo de la homaro.

Tial ni kuraĝis traduki kelkajn fragmentojn el lia verko.

..... Komence de la jaro 1918a mi streĉe laboris; estis unu el tiuj pezaj someraj posttagmezoj, kiuj el la malseka Champagne-regiono faras ardan fornon, briletantan dezerton.

Kuŝis amaso da vunditoj, la plej multaj el ili jam de kelkaj tagoj atendis flegadon. En la tendo, kiu servis kiel operaciejo, regis sufoka varmego, nia laboro estis senesperiga; sur niaj brustoj ni sentis la premon de la milita demono. La necesaĵoj de la momento superregis nin, ili incitis kaj lacigis nin. Mi staris inter du vunditoj lavante miajn gantojn, kiam mi ekvidis, ke mia kunulo

rigardas eksteren tra tegmentan fenestreton. Subite lia laca mieno kvietiĝis, sur ĝi montriĝis paco.

„Kion vi rigardas?” mi demandis lin.

„Ho, nenion,” li respondis. „Mi ĉerpas iom da trankvilo ĉe tiuj arbopintoj, kiujn vi tie vidas. Tio refreŝigas min.”

..... En ĉi tiu momento kuŝas en mia apudeco angla soldato, el la lando de York. Li havas vundon en la subventro, kiu disordigis eĉ la plej naturajn funkciojn de lia korpo kaj sekve de kio li mizere vivadas. Li apenaŭ similas plu homon, sed kompatindan beston, kiu sin malpurigas, deliras, ĝemas, kaj ofte eĉ ne rekonas la helpantan, flegantan manon. Li ne parolas nian lingvon, kaj mi lian nur tre kriples. Ĉio, kion li kapablas, estas alrigardi min per siaj profunde ĉagrenaj okuloj. — Tiuj okuloj petas de mi miraklon, de mi, kiu estas senpova.

Sed kiam mi ĉimatene venis al li, li ridete alrigardis min, unuafoje! — rideto klera, kaj esperplena, kia de iu, reaperinta el la morto.

Kaj jam baldaŭ mi ekkonis la kaŭzon de tiu granda ĝojo, ĉar de sub sia kuseno li prenis cigaredon, kiun li tie kaŝis kaj sekrete gardis por mi, kaj kiun li tiam al mi donis.....

adapte, N. KOOL.

ĈU KASTELO?

Malalta ĝi estas, la dometo, kaj malnova, eĉ kaduka. Lukso tute mankas en ĝi kaj komforto nur ete ĉeestas. Malgraŭ tio kelkdekoj da esperantistoj el plej diversaj kaj malproksimaj lokoj iris al tiu malgranda domo en West-Graftdyk, al kiu niaj humoraj TJO-anoj tie havigis la nomon „Nia Kastelo”.

Dum la tritaga TJO-konferenco ni sesfoje kunvenis en ĝi. Kvar interesajn prelegojn ni aŭskultis kaj en du festvesperoj ni ĉeestis. Pri la aranĝoj de TJO en 1946a vi legos aliloke en tiu ĉi gazeto. Pri la enhavo de la paroladoj mi ne intencas raporti. Mi nur volas diri ion pri la sfero en tiu dometo. Ĝi estis tute diferenca de la sfero en kinejo, kafejo, kunvenejo, teatro aŭ koncertejo. Kvankam multaj ĉeestantoj neniam vidis unu la aliajn, ili tute libere kaj kompreneme interparolis.

Post la enkondukaj vortoj sekvis viglaj interŝanĝoj de opinioj kaj pensoj. Dum la festvesperoj ĉiu prezentis ion laŭpove. Sinsekve kaj seninterrompe okazis kantado, deklamado, muziko, rakontoj. Agrable estis konstati, ke la ĉeestantoj malkaŝe eldiris siajn opi-

niojn, kaj tute sin fordonis al tutkora partopreno en ĉio, kio okazis.

Per la seriozaj prezentadoj ni pliriĉiĝis spirite, per la humoraĵoj kaj ŝercoj anime, kaj per la bongustajoj materie. La vere Zamenhofa spirito regis dum ĉiuj kunestoj. Toleremo, komprenemo kaj amikeca gajeco kaŭzis la festan sferon en kiu ni sentis nin feliĉaj.

Forirante mi kelkajn momentojn rigardis al la kaduka dometo. Kabano, kaj tamen: Kastelo!

Kastelo, pro la hejmeco kaj amikeco regantaj en ĝi.

Amsterdamo, 5—1—'46.

MARY KRYT.

LA ESPERANTO-MONUMENTO RELEVIGOS!

La 30a de majo 1935a estis grava tago por la esperantistoj de la nederlanda insulo Tesel: okazis la solena inaŭguro de la Esperanto-monumento. Flirtis flagoj, sonis kantoj; eminentaj personoj paroladis kaj laŭdis la iniciativon de la fondintoj kaj la belformon de la monumento: „Brilu la verda stelo eterne kiel simbolo de la espero

1942a. Germanaj fanatikuloj forrabis la stelon kiu kronis la memorsignon. Kelkajn monatojn poste ili devigis laboristojn frakasi la tutan monumenton. S.S.-anoj grimace observis kiam detruigaj martelbatoj falis sur la altan kolonon kaj la brikoj dispecigite ĉirkaŭjetigis. Sed kiam ili dum momento forturnis sin, lertaj manoj fulmrapide forkaŝis la buston de dro Zamenhof kaj la gnejsan platon kun la surskribo „Esperanto”. Savitaj por pli bonaj tempoj.....

Per la detruo la germanoj elverŝis sian koleron. Sed ne restis je tiu simbola fiago; poste multaj Tesel-anoj falos en la batalo por la libereco. La 6an de aprilo, 1945a 10 senkulpaĵaj civitanoj estis mortpafataj sur la marbordo; inter ili estis s.ro Joh. Duinker, „la patro de la monumento”, kiu iniciatis kaj ellaboris la planojn por la monumento.....

Post la milito oni retrovis la stelon sendifekta, kaj kun tio la historio de la tesela memorkolono fariĝis simbola por la tuta nederlanda esperanto-movado.

La stelo restis brilanta! La germanoj ne povis detrui ĝin; ankaŭ la fundamento ankoraŭ kuŝas tie, fundamento, sur kiu oni rekonstruos la monumenton samstile.

Tiam ni spertos denove, ke la batalo de la spirito povas venki la krudan perforton! Adapte laŭ „Texelsche Courant”.

Nota: Multa mono necesas por la restarigo de la monumento! Kiu povas malhavi iom bonvolu ĝin sendi al la „Monumenta Komitato”, p/a Th. Thies-sen, den Burg, Texel.

PRI NIA ORGANIZO.

La geperantoj de nia organizo en Belgujo dum kunveno je decembro pasinta unuanime esprimis la deziron, ke TJO aliĝu al la „Internacia Esperanto-Ligo”.

Ĉi tiu sono ne estas nova; jam en nia Internacia Junularkunveno en 1939a ni larĝe priparolis tiun temon, kaj konkludis, ke aliĝo al IEL estas ne (aŭ ne jam) dezirinda. Ke tiu decido ne kontentigas nin, en ĉi tiu tempo, en kiu la neceso de unueco estas pli ol iam komprenata, montriĝas klare el la belga kunveno. Montriĝis plue jam tuj post la milito, kiam ankaŭ kelkaj estraranoj instigis pri aliĝo al IEL. En estrarkunveno komence de decembro ni prikonsideris la eblon kaj neceson. Rezulton ni ne atingis; kompreneble, ĉar ni celis nur aŭdi la opiniojn por pritrakti ĝin poste en la tuta TJO-rondo. Ricevinte ĵus informojn de IEL, ni pristudas la temon. Ni tamen objekte konsideru la problemon ĉiuflanke, kaj tiam ni unue venas al la demando: Kial aliĝi ĝuste al IEL? Kial ne al UEA? Kial ne al la religiaj aŭ politikaj esperanto-organizoj?

Oni diros: TJO estas neŭtrala, kaj IEL same. Jes, sed TJO estas neŭtrala en tiu senco, ke en ĝi reprezentigaĵas diversaj religiaj kaj politikaj doktrinoj. Ĉu niaj katolikaj membroj ne prefere aliĝos poste al la katolika ligo, ol al IEL; kaj ĉu ne same la anoj de aliaj religioj aŭ konvinkoj aliĝos prefere al sia samideana ligo? Se ni aliĝas al IEL, tio signifas ke niaj membroj je plenaĝiĝo devus transiri al ĝi. Ĉu ni deziru tion?

Oni diros: Ankaŭ en IEL estas loko por ĉiu. Jes, efektive. Sed dume SAT, IKUE, ktp. *ekzistas* kaj laŭ mi tio *ne* estas bedaŭrinda; male. Politika, religia konvinko okupas la tutan homon. Tial la religianoj plej bone povas labori kiel *religiaj* esperantistoj; tial politika esperantisto ĉerpas sian forton el sia politika konvinko. Domaĝa la ekzisto de la diferencaj internaciaj organizoj nur fariĝas, se la diversaj ne trovas unu la alian sur la tereno de komuna intereso.

Mi opinias, ke la tasko de TJO ne estas, konduki la junularon al utopia unueco, kiu nenie ekzistas, sed *al la harmonio de diferencoj*.

Sekve: ni interkontraktigu kun IEL, sed ankaŭ kun SAT, IKUE, KELI.

Sed — nur tiam, kiam la tempo estas matura por tio; tio signifas: kiam TJO tute restariĝis kaj fariĝis organizo, forta kaj valora. Antaŭ ĉio: TJO kresku, saniĝu de la militaj vundoj kaj nur tiam ekpaŝu eksteren.

En la sama kunveno la belga sekcio proponis ke TJO fiksu aĝolimon por siaj aktivaj membroj (Nia statuto distingas aktivajn kaj subtenantajn membrojn, sed ne klare difinas tion). Ankaŭ en nederlandaj kunvenoj oni aludis tiun temon; la ĝenerala opinio tie tamen estas alia; ĝuste la junaj membroj ne deziras fiksi aĝolimon. Kelkaj opinias tiel: „TJO ne estas nur organizo *de* la junularo, sed ankaŭ *por* la junularo. Do: ĉiu kiu laboras por la junularo trovu lokon en ĝi. Ni ne deziras barilojn inter la popoloj, ni tamen ankaŭ rompu la murojn inter la junularo kaj plenaĝuloj. Ni formu grandan familion.”

Certe respektinda vidmaniero.

Aliaj diras: „Se ne ekzistas aĝolimo, tiam TJO fariĝas plenkreskula movado kun junulara fako.” Ili timas, ke sen aĝolimo la plenkreskuloj „havos la parolon” en la organizo.

Mi kredas, ke se la belgaj anoj vizitus la nederlandajn membrokunvenojn, kaj firme spirus la „TJO-sferon”, ili jam ne plu havus tiun timon. Sed, objekte, mi ne volas nei la eblan danĝeron. Mi opinias tiel: TJO bezonas aĝolimon, kiu eventuale permesas provizorajn esceptojn por plenaĝaj funkciuloj, kiuj ne tuj estas anstataŭeblaj per junuloj. Sed: limo ne estas *tuj* aktuala kaj necesa. Pri pensu, ke TJO estas en la stadio de fariĝo, en kiu ĝi bezonas ne nur la monan, sed ankaŭ la *faran* subtenon de plenaĝuloj. Ni multe perdis pro la milito. La junaj membroj de 1939a fariĝis plenaĝuloj de 1939a ĝis 1946a! En la okupitaj landoj dum tiuj jaroj ne venis novaj junaj esperantistoj, kaj ili ankaŭ nun ne falas pluve el la aero!

Do denove: unue rekonstruo. Due ni jam akcelu la ŝanĝojn *evolue*. Estu certa, ke la estraro faras ĉion por transdoni la laboron al la junaj membroj; ĝi pruvis tion. En la venonta jarkunveno ni havos la okazon detale preparoli la diversaĵojn; ni dume ne perdonian tempon per rezonado pri internaj aferoj, en la tempo ke pozitiva laboro pli ol iam necesas.

Floor M.

INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO DE TJO.

Somero 1946: Ĉar ni ankoraŭ ne ricevis definitivajn proponojn el Nord-francujo kaj Belgujo, ni ne jam povas sciigi detalojn pri la internacia kunveno. Estas tamen jam certe, ke la kunveno diferencos de la unuaj kunvenoj en Groet kaj Tervuren, ĉar, kiel ni jam anoncis, ĝi estos por la matura junularo kaj junulargvidantoj. Tio signifas, ke ni dediĉos nin pli al la solvoj de aktualaj problemoj ol al la amuza pasigo de nia ferio! Kaj sekve estas necese, ke niaj grupoj jam nun pritraktu la aferojn, pri kiuj ili deziras sol-

vojn aŭ ŝanĝojn. Ni pensas ekzemple pri la kunlaboro kun aliaj organizoj kaj la eventuala fikso de agolimo por aktivaj membroj (vidu la notojn pri tio aliloke en la gazeto). Oni zorgu, ke la ĉeestontoj de la kunveno antaŭe havu klarecon pri la diversaj organizaj aferoj, por ke ni en la int. kunveno ne perdu tempon per diskutado.

Malgraŭ la pritraktotaj „organizecaj” aferoj, la kunveno fariĝu vera „TJO-kunveno”! Pli ol la pli-malpli gravaj internaj aferoj la aktualaj nuntempaj mondproblemoj havu nian atenton. Nia kunveno fariĝu manifestacio de la paca volo de la mond-junularo!

En la vesperaj variaj programoj ni havu regule prelegon pri iu kultura temo. Ni petas la ĉeestontojn sciigi al la sekretario, se iu deziras fari prelegon pri ia temo.

Ni akcentas, ke ni nepre ne akceptos subtenantajn (plenaĝajn) membrojn, kiuj ne aktivigas je la tereno de la junularlaboro. F. M.

KARAJ GEAMIKOJ.

Neeble priskribi la grandan ĝojon kiun mi havas, skribante ĉi tiujn malmultajn vortojn al la tutmonda gesamideanaro.

Antaŭ dek jaroj malaperis la nomo „Hispanujo” el la esperantistaj gazetoj, pro diversaj kialoj pri kiuj iam mi parolos. Hodiaŭ ili reaperas; ne tre energie, ĉar la Esp. movado ege suferis en mia lando dum la lastaj jaroj, kaj nun ĝi ekrevigliĝas iom post iom kaj kun grandaj baroj kaj malfacilaĵoj antaŭ ni, sed, certe, kun firma konvinko je baldaŭa venko, kiel jam okazis en aliaj landoj.

Grandan ĝojon kaŭzis al mi la unuaj postmilitaj esperantistaj ĵurnaloj, kiujn eldonas nia agema samideanaro en Francujo, Nederlando, Svedujo, Anglujo, kaj aliaj landoj, pruvanta ke Esperanto ne mortis, kiel mi kredis dum la lastaj dek jaroj, dum kiuj mi malmulte sciis pri la eksterlanda movado. Hodiaŭ denove kontaktante kun preskaŭ la tuta mondo, mi konstatas mian grandan eraron kaj komencas la disvastigan laboron kun pli da emo kaj kun nova kaj pli forta energio. Se multaj eks-samideanoj forgesis Esperanton kaj forlasis ĝin, ni ne bedaŭru, kaj ni ĉiam havu antaŭ ni la karajn strofojn: „Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj Velkantajn foliojn deŝiras, Ni dankas la venton.....”.


Kaj nun karaj geamikoj, deziru al mi feliĉon en la tasko kiun mi nun komencas kiel ĉesperanto en Hispanujo. Mia sukceso estos sablero por la sukceso de TJO kaj por la realiĝo de l'revo kiun ni ĉiuj same sentas: la interfratiĝo de la homaro.

Octavio de Diego de la Rosa, Hispanujo.

La unua postmilita kongreso de la ned. esp. asocio „La Estonto Estas Nia” okazos dum pasko ĉijare en Amsterdam.

Leciono 3.

FELIPO.



Mi, Felipo Novano, estas hispano.
 Ĉu vi ankaŭ estas hispano?
 Ĉu vi ankaŭ loĝas sur insulo?
 Mi ne ludas kun amikoj sub la palmoj, ĉar mi laboras. Jes! mi laboras kun Patro.
 Je lundo, je ĵaŭdo kaj je sabato ni iras kun nia mulo kaj du korboj al la vilaĝoj en la montoj.
 Ĉirkaŭ la buŝo de la besto estas ŝnuro; la fino de la ŝnuro estas ĉirkaŭ mia pulso. En la korboj estas tomatoj kaj legomoj. La homoj en la vilaĝoj aĉetas; ni vendas.

Ĉu vi vendas? Ne!
 Ĉu vi aĉetas? Jes!

o

best-o	hom-o	la legom-o	la puls-o
la buŝ-o	la hom-o	lund-o	sabat-o
la fin-o	ĵaŭd-o	la mont-o	la ŝnur-o
hispan-o	korb-o	mul-o	la tomat-o


as

ili aĉet-as	vi aĉet-as	vi labor-as	vi vend-as
ni aĉet-as	mi labor-as	ni vend-as	
ĉirkaŭ	jes	unu	
je	ne	du	

Ekzerco: Metu en la negativaŭ formon: Ni iras al la montoj. Ili estas hispanoj. Via patro laboras. En la korboj estas tomatoj. Ili vendas en la vilaĝoj. La knabinoj iras al la kino.

Ekzerco: Metu la samajn frazojn en la demandan formon.

Gramatika enhavo: la litero ĵ;
 la persona pronomo: vi
 la poseda pronomo: via
 la verbo: as
 la demanda formo: ĉu
 la prepozicioj: ĉirkaŭ — je
 ripetado: oj



Je la tagmezo ni haltas. Patro kaj mi sidas sub arbo kaj ni manĝas kaj trinkas. Post la manĝo venas la horo de ripozo: „la siesto”. Ni kuŝas sur la dorso en la ombro de kaŝtan-arbo kaj ni ripozas.

Post la siesto ni iras al la farmoj. Nun la homoj ne aĉetas: ili vendas. Nun ni ne vendas: ni aĉetas.

En la posttagmezo ni iras kun la mulo al *nia* vilaĝo. En la korboj estas ovoĵ. Nun la mulo ne iras: nun ĝi kuras, ĉar ĝi iras al la stalo. Ĝia nomo estas Blekemul.

o

arb-o	la hor-o	la nom-o	la ripoz-o
la daŭrig-o	la kaŝtan-o	la ombr-o	la siest-o
la dors-o	kaŝtan- <i>arb-o</i>	ov-o	la stal-o
la farm-o	la manĝ-o	la post-tagmez-ola tag-mez-o	

as

ni halt-as	ĝi(!) kur-as	ni sid-as	nun
ĝi(!) ir-as	ni ripoz-as	ni trink-as	
ĝi	ĝia	ĝi(!) ven-as	

Ekzerco: metu en la pluralon: La tigro haltas sub la arbo; ĝi trinkas. La leono kuŝas sur la roko; ĝi dormas. La mulo iras al la stalo; ĝi kuras. La knabo estas en la maro; li naĝas.

Ekzerco: metu la samajn frazojn en la negativan formon.

Ekzerco: „ „ „ „ „ „ „ demandan „

Gramatika enhavo: la persona pronomo: ĝi;
la poseda pronomo: ĝia;
la verbo: as;
ripetado: je — post; ne — ĉu.

Korekto: En la dua leciono (dec.-jan.-No) staris: „nea prepozicio”. Tio estis eraro, ĉar *ne* estas adverbo. — Paĝo 24a, linio 11a: Les Palmas d.e. Las Palmas. El la vortlisto elfalis la vorto „nur”. Oni aldonu tiun vorton al la listo.

MON-MONOLOGO.

Mono estas laŭ la ekonomoj mezurilo de valoroj, laŭ la teologoj ĝi estas la koto de la tero. La ordinara civitano nomas ĝin kapi-talo kaj la dommastrino diras, ke ĝi estas muelita sablo, ĉar ĝi forglitas tra la fingroj. La administrantino de „La Juna Vivo” opinias ke mono estas necesa nutraĵo por ŝia gazeto. Kaj ju pli multe da nutraĵo, des pli dika „La Juna Vivo”.

Ĉar la eksterlandaj membroj de TJO ne ankoraŭ povas transendi monon al Nederlando, la holandaj amikoj de TJO kaj LJV komprenu la situacion kaj ili laŭpove kaj malavare subtenu nian gazeton per mondonacoj. Tiel LJV denove estos 8, 12 aŭ 16 paĝa kaj ĉiuj membroj de TJO ĝojos pro tio.

Do kolektu en via grupo aŭ sendu mem subtensumon al la TJO-Centro en West-Graftdyk, pŝtĝiro 382363, kaj aldonu ĉe ĉiu monsendo: subteno por „LJV”. Ni mencias la ricevitajn sumojn en LJV. Onklo Pit.

Jam ni ricevis: J.Pr: f 10; S.ino P: f 10; Geedzoj K.: f 10; R.: f. 10; de G.: f 20; F.ino G. en L.: f 2,50; M. en L.: f 0,25; v. L. en A'dam: f 1,50; S.ino L. en M.: f 1,25; D. P. G. en T. s. A. (Franc): f 13,70; F.ino R. en S. S. (Kimr): f 12; F.ino S. en B.: f 0,53; G. C. J. en R.: f 1,60; D. en D.: f 0,53; F.ino A. S. en W.: f 0,53; J. B. en N. on T.: f 0,53; S.ino G. en B.: f 0,53 (ĉiuj en Angl).

LA HORLOGO.

La familio Johanido posedis altan murhorloĝon.

Iun tagon ĝi ne plu funkciis. La patro prenis la horloĝon por porti ĝin al horloĝisto. Tenante ĝin antaŭ si, li ne povis vidi la homojn sur la strato, kaj subite li koliziis kun sinjorino.

Ŝi koleris, kaj diris: „Stultulo, kial vi ne portas poŝhorloĝon, kiel aliuloj!”

TJO-RUBRIKO.

Belgujo (Ĉefperanto C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge): La 29an de dec. okazis grava laborkunsido de la belgaj geperantoj (kies nombro, parenteze, regule kreskas). Carlos skizis la historion de la belga sekcio, kaj memorigis pri la rezultoj de la lasttempa laboro. Oni fiksas la propagandmetodojn por 1946a, i.a. per la radio, nacia gazetaro kaj propagandfestoj. La sekcio principe akceptis aranĝi la internacian TJO-kunvenon, kaj proponos detalojn al la estraro. La ĉeestantoj esprimis la deziron, ke TJO aliĝu al IEL, kaj mem akcelas kunlaboron al belgaj esp. organizoj. Oni decidis fiksi aĝlimon por la aktivaj membroj kaj instigis, ke la plenaĝuloj restu subtenantoj, sed nepre aliĝu al iu landa kaj internacia organizo. — La kunsido finiĝis per avokoj al la belga esp. junularo por kunlaborado kaj al la geanoj por streĉa laboro; por efikigi ĉi lastan oni aranĝos intergrupajn kunvenojn. — La 3a TJO-Bulteno aperis; ĝi bonaspektas kaj enhavas gravajn organizajn komunikojn.

Britujo: En la lasta, belaspekta TJO-bulteno troviĝas foto de niaj ĉeĥaj geamikoj, la familio Bartošík. Dum ilia restado en Anglujo dum la militaj jaroj ili malavare subtenis la TJO-movadon. Nun ili reiris al Ĉeĥoslovakujo, kie S. ro Bartosik estros la Esp. Fakon de la Ministerio de Informo.

La knabinoj de Tinkers Farm lernejo, sub la gvidado de F. ino Sawyer, prezentis Esp. programon al kunveno de geinstruistoj en Birmingham.

Francujo: Ĉefperantino S. ino M. Turin-Montagnon, Trépot, Doubs): En Francujo la esperantista movado tiom dormis dum la milito, kaj por multaj la milito tiom ŝanĝis la kondiĉojn, ke estas multega laboro por fari. Multo jam fariĝis. Jam okazas kursoj en multaj lokoj, kaj pli da junuloj ol antaŭ la milito interesiĝas pri Esperanto. Multegaj estas estontaj TJO-anoj, ekzemple la gelernantoj de S. ro Stuit en en Arras, kiu gvidas 4 kursojn semajne.

Kun G. E. E. (Grupo de la Esperantistaj Edukistoj) ni interŝanĝis leterojn de kelkaj monatoj. Jen la decido: En Francujo estas grupo da junaj infanoj: 10—15 jaraĵ, kiuj komencis lerni esperanton en la lernejo. Ili havos gazeton en Francujo, ĉar „LJV” estas iom malfacila por ili. Kiam ili fariĝos pli aĝaj kaj pli lertaj esperantistoj, la gvidantoj konsilos al ili aliĝi al TJO.

M. T.—M.

Hispanujo: Nia 19-jara amiko Octavio de Diego de la Rosa, Baltazar Gracián 12-3°, Zaragoza, akceptis fariĝi ĉefperanto por sia lando (vidu lian leteron aliloke). Ni kredas, ke li havas la plej malfacilan taskon el ĉiuj niaj perantoj, kaj tial: des pli kore al li forton kaj kuraĝon!

Nederlando (Ĉefperanto H. Uittenbogaard, Koekkoekstr. 22, Hilversum): La Ned. Sekcio de TJO faris interkonsenton pri kunlaboro kun la „Ned. Jeugd-Gemeenschap” (Ned. Junular-Komuno). Ĉi tiu N.J.G. estas federacio de preskaŭ ĉiuj nederl. junular-organizoj. Ni notas ĉi tie koncize la enhavon de la interkonsento: 1. Membroj de N.J.G., rajtas ĉeesti landajn kunvenojn de TJO. — 2. TJO disponigas instruistojn por la organizado de Esperanto-kursoj en N.J.G. — 3. TJO prizorgos la okazigon de prelegoj kaj ev. de filmprezentado pri Esperanto. Ĝi daŭre informos la NJG-anaron pri la

Esp-movado. — 4. NJG disponigos kiom eble siajn konstruaĵojn, salonojn kaj terenojn por TJO-kunvenoj. Ĝi rajtigas la TJO-anojn ĉeesti diversspecajn NJG-kunvenojn. — 5. TJO helpas la NJG-anaron je la kontakto kun eksterlandaj rilatoj.

Svedujo: Bonvenon al nia nova ĉefperanto: *Karl Erik Karlsson (22-jara), Upplandsgatan 69^a, Stokholm, ĝironumero: 252674*, kiu jam vikle laboras: Jam estas perantoj i.a. en Stockholm, Göteborg, Karlskrona, Sundsvall, Skövde. Ĉiutage venas novaj membroj kaj abonantoj al nia organizo. Ni klopodas kontaktiĝi kun aliaj junularorganizoj: religiaj, politikaj, idealistaj, kaj mi scias, ke la junuloj tre interesiĝas pri Esperanto kaj la ebleco korespondi kun gejunuloj en la diversaj landoj. — La 8-an de januaro mi dissendis la unuan numeron de la sveda TJO-bulteno. K. E. K.

Svisujo: Nia 19-jara amiko *Eugen Klee, Brasselmühle, Rheineck*, entuziasme komencis sian laboron kiel ĉefperanto (anstataŭ Walter Kobelt). Sukceson al ili! Svisoj, kontaktiĝu kun li.

KORESPONDADRESOJ.

Britujo: Mi bezonas 14 adresojn de knaboj, kiuj volas korespondi kun anglaj knaboj en mia klaso Adr: A. G. Bath, 4 Queens Rd., Colchester, Essex.

Al Esperantistoj ĉie en la mondo! La anoj de la Westen-super-Mare Esperanta Societo dez. kor. kun Esperantistoj en ĉiu lando. Bonvole skribu al s-ro D. Rankin (Sek.), 30 Mansfield Av., Westen-super-Mare.

S-ro Alan D. Corré (19-jara), 46 Rurland Park Mansions, Willexter Green, London N.W. 2, deziras korespondi.

Bulgarujo: S-ro Tabakov, str. „Iavorov” 8, Burgas, dez. kor. kun gejunuloj esperantistaj en ĉiuj landoj.

Finnlando: Salutojn kaj korespondproponojn el la tuta mondo sendu al Esperanto-kurso. Yhteiskoulu, Somero, Finnlando. Estas gelernantoj 10—20 jaraj de gimnazio kaj kelkaj instruistoj.

Franĉujo: S-ro A. Dumarquez, Dir. du Cours Complémentaire, Dèvres, Pas de Calais, serĉas gekorespondantojn por siaj 15—18 j., kursanoj.

Korespondu kun francaj gesamideanoj! Skribu tiucele al: S-ro D. Perez, rue des Rentiers, Tarascon-sur-Ariège.

Hispanujo: Emanuela Cortado (Buensuceso IO-2o — 1a, Barcelona) invitas siajn korespondantojn rekomenci la korespondadon. Li tutkore salutas ilin kaj deziras al ĉiuj feliĉan novjaron.

José Martí tutkore salutas siajn amikojn, kun kiuj li antaŭe korespondis, li deziras daŭrigi la korespondadon kaj deziras al ĉiuj amikoj feliĉan 1946an. (Adr: Buensuceso IO—20 — 1a, Barcelona).

Italujo: S-ro Luigi Schettin, Via del Quartiere 11, Vicenza, dez. kor., per il. poŝtk. kaj let.

Nederlando: 9—15 jaraj gelernantoj deziras korespondi por il. poŝtkarto. Gvidantoj skribu unue al: F.ino G. Bankersen, Koogerpolder n/b West-Graffdyk.

30 gejunuloj volas korespondi kun gejunuloj en ĉiuj landoj de la mondo. Resp. certa. Adr: A. Schouten, „Nia Idealo”, Koedyk.

10—17 jaraj gelernantoj dez. kor. per ilustr. poŝtk. Skribu unue al la gvidanto: W. v. d. Hoff, West-Graafdyk.

3 sportamaj junuloj dez. kor. kun 3 fraŭlinoj, 17—19-jaraj. Prefere eksterlandanoj. Leterojn al S. Damiaans, Kanaaldijk 280, Koedijk.

Fino A. Spaans, Texel, Oosterend, Westerstr. 40, serĉas por siaj gelernantoj (13—16 jaraj) korespondantojn, kiuj dez. kor. per il. poŝtk.

Norvegujo: S.ro Alf. Bjerke, Krokstien 6, Hellerud, poŝtk. 21, Bryn St. dez. kor.

Portugalujo: João Frazão de Faria (16-jara) serĉas proksimume samagan korespondantinon en Nederlando, kiu sufiĉe bone scipovas Esperanton, kaj kiu interesiĝas pri la interŝanĝado de Esp. libroj.

Svisujo: S.ro Petitpierre, 14 rue Chauvet, Genève, dez. korespondantojn por 25 komencantoj, 17—40 jaraj.

PERANTOJ.

	TJO	LJV
Belgujo : C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo : F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	4 ŝil.	ŝ 2/6
Danujo : C. Jensen, Musikhuset, Nykøbing, F.	5 kr.	3 kr.
Finnlando : Svante Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola ...	125 kr.	75 kr.
Francujo : S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs.	100 fr.	60 fr.
Maroko : S.ino I. Fink, 5 rue de Savorgnan de Brazz, Casablanca	100 fr.	30 fr.
Nederlando : TJO-Centro, West-Graafdyk, ĝiro 382363	f 2,50	f 1,50
Portugalujo : A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Norvegujo : Norv. Esp. Ligo, Box 942, Oslo	4 kr.	2,4 kr.
Svedujo : K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69 ^a , Stockholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo : Eugen Kleen, Brasselmühle, Rheineck ...	4 fr.	2½ fr.

„La aranejoj”. kaj „La vivo de l'eskimoj” aperis en la unua serio de „Ĉirkaŭ la mondo”, ilustritaj kulturtekstoj por la gejunularo, verkitaj de Prof. Agostinho da Silva, Portugalujo. Belaspektaj, ilustritaj libretoj, eld. Portugala Eldona Rondo, Monté da Lapa, 49-1. Prezo: 0,50 sv. fr. aŭ 2 int. resp. kup. La libretoj ankaŭ estas mendeblaj ĉe TJO-Centro, W.-Graafdyk. Prezo po 30 c.

Ni propagandu! En multaj lokoj la Unuiĝo por Fremdultrafiko baldaŭ farigos novajn prospektojn. Jen do tasko por la esperantistoj: Vizitu la diversajn lokajn estrarojn, kaj instigu ilin eldoni la novajn gvidilojn ankaŭ en Esperanto!